

La instruado de la fremdaj lingvoj kiel publika politiko

Studo mendita de la Alta Konsilio de la taksado de la lernejo, redaktita de profesoro François GRIN*.

La kompleta 127-paĝa PDF-dokumento estas elŝutebla ĉe :

<http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf>

Eltiraĵoj (*kursive*)

En tiu raporto estas ekzamenataj tri planoj :

« Ĉio-nur-angle » (plano 1) ;

« Plurlingvismo » (plano 2) ;

« Esperanto » (plano 3).

p. 6-7 — *Emfazitaj estas ĉi tie ne la konsekvencoj de la efektiveco de tiuj planoj, sed nur ilia komparo en la senco de efikeco kaj justeco. Konsiderante la novecon de la kadro de analizo kaj la foreston de sufiĉaj konoj, la taksado povas esti nur proksimuma kaj ĝi celas nur havigi gradon de grandeco ; tio estas tamen, laŭ mia kono, la unua fojo kiam oni provas kalkuli la netajn transdonadojn pri kiuj profitas la anglalingvaj landoj pro la superrangeco de la angla, kaj la ŝparaĵojn, kiuj estus efektivegigitaj en kazo de transiro al alia plano. Estas memkompreneble, ke ne estas la angla lingvo kiu kulpas kiel tia, sed la lingva hegemonio, kiu ajn estas la lando aŭ la landogrupoj, kiu profitas el tio. La ĉefaj rezultatoj de la komparo inter la planoj estas la ĉi sekvaj :*

1) la Unuiĝinta Reĝlando nete gajnas minimume 10 miliardojn da eŭroj ĉiujare pro la nuna superrego de la angla;

2) se oni prikonsideras la multiplikan efikon de certaj komponantoj de tiu sumo, kaj ankaŭ la rendimenton de la kapitaloj, kiujn la anglalingvaj landoj povas investi aliloke pro la privilegiita pozicio de sia lingvo, tiu totalo sumas je 17 ĝis 18 miliardoj da eŭroj jare ;

3) tiu sumo estus certe pli alta se la hegemonio de tiu lingvo plifortiĝus pro prioritato, kiujn koncesius al ĝi aliaj Ŝtatoj, precipe en la kadro de siaj respektivaj edukpolitikoj ;

4) tiu sumo ne enkalkulas la apartajn simbolajn efikojn (kiel la avantaĝo pri kiuj ĝuas la denaskaj parolantoj de la hegemonia lingvo en ĉiu situacio de intertraktado aŭ de konflikto okazanta en ilia lingvo) ; tamen tiuj simbolaj efikoj havas sendube ankaŭ konsekvencojn materiajn kaj financajn ;

5) la plano « plurlingva » (kiu povas, praktike, havi tre diferencajn formojn, inter kiuj unu estas ĉi tie analizita) ne reduktas la kostojn, sed la malegalecojn inter parolantoj ; tamen, pro la fortoj manifestiĝantaj en la kunpuŝiĝo de la lingvoj, ĝi prezentas riskon certan de malstabileco kaj postulas tutan aron da antaŭrimedoj por esti vivpova ;

6) la plano « Esperanto » aspektas kiel la plej avantaĝa, ĉar ĝia konsekvenco por Francio estus neta ekonomio proksima al 5,4 miliardoj da eŭroj jare kaj, nete por la tuta Eŭropo (inkluzive la Unuiĝinta Reĝlando kaj Irlando), de ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj jare.

La oftaj reagoj de rifuzo rilate al Esperanto malebligas la realigon de tiu plano 3 en mallonga tempo. Ĝi povas, tamen, esti rekomendita en la kadro de strategio longdaŭra efektivegita en unu generacio. Du kondiĉoj estas tamen decidigaj por ĝia sukceso : unue, tre grava informstrebado, cele superi la antaŭjuĝojn, kiuj ĉirkaŭas tiun lingvon – kaj kiuj ĝenerale baziĝas sur la nura nescio – kaj helpi al mensevoluado; due, vera interŝtata kunordigado cele al komuna starigo de tia plano. Okdek kvin procentoj de la loĝantaro de la dudekkvin-ŝtata Eŭropo havas en tio evidentan rektan intereson, sendepende de la politikaj kaj kulturaj riskoj kiujn enhavas la lingva hegemonio.

p. 65-66 — *La lingva hegemonio (...) favore al la angla estus tre malbona afero por Francio kaj ankaŭ por ĉiuj Ŝtatoj neanglalingvaj de Eŭropa Unio, eĉ preter la landlimoj de la Unio. Kial ? Ĉar tiu formulo estigas plejeble maljustan redistribuadon tra la kvin vojoj kiuj estas la sekvaj :*

1) pozicio de kvazaŭ-monopolo sur la merkatoj de la tradukado kaj interpretado al la angla, de la redaktado de tekstoj en la angla, de la produktado de pedagogia materialo por la instruado de la angla kaj de la instruado de tiu lingvo ;

2) la ŝparo de tempo kaj de mono en la internacia komunikado, ĉar ĉiuj parolantoj nedenskaj faras la strebadojn esprimiĝi en la angla kaj konsentas akcepti mesaĝojn dissenditajn en tiu lingvo ;

3) la ŝparo de tempo kaj mono por la anglalingvanoj, pro la fakto ke ili ne plu multe strebas por lerni aliajn lingvojn

4) la rendimento de la investo, en aliaj formoj de homa kapitalo, de la monrimedoj, kiujn la anglalingvanoj ne plu bezonas investi en la lernado de la fremdaj lingvoj ;

5) la superregata pozicio de la anglalingvanoj en ĉiu situacio de intertraktado, de konkurenco aŭ de konflikto disvolviĝanta en la angla.

La ekzisto mem de tiuj distribuaj efikoj estas malmulte konata ; necesas diri ke la esploroj, kiuj atentigas pri ili (certaj estas fakte jam menciitaj en la franca jam de longa tempo, vd ekzemple Carr, 1985) restis relative konfidencaj. Ĝis nun, ili ne estis objekto de detala taksado (Grin, 2004a) ; sed la antaŭtaksadoj faritaj en la ĉapitro 6 indikas ke tiuj sumoj kalkuliĝas en miliardoj da eŭroj jare. Sur ĉiu alia tereno de la politiko, tiaj transdonadoj estus tuj publike malaprobataj kiel neakcepteblaj.

p. 70 — *Pro tio necesas rememorigi la ekziston de tria strategio, t.e. la investado je longdaŭra templimo, kaj nepre kunordigita inter Ŝtatoj de la Unio, en la instruado de Esperanto. Tiu ĉi raporto ne celas absolute defendi tiun opcion, ĉar ni scias ke ĝi ofte estigas pasiajn reagojn aŭ ke ĝi estas tuj forpuŝita sen ia ajn argumento, aŭ surbaze de argumentoj fontantaj el miriga nescio. (Piron, 1994, 2002).*

(...) La sinturno al Esperanto estas do en la evidenta intereso de pli ol 85% de la eŭropaj civitanoj, precipe post la plilarĝiĝo okazinta en 2004.

En kazo de elekto de Esperanto :

p. 102 — *En la tempospaco de unu generacio, maljustaj transdonoj de miliardoj da eŭroj estas elimineblaj, kaj je skalo de Eŭropa Unio, neta ŝparo de pli malpli 25 miliardoj da eŭroj jare estas ebla. Komparcele, la tuto de la budĝetitaj elspezoj por 2005 fare de Eŭropa Unio sumas je 116,55 miliardoj da eŭroj. Oni malbone vidas pro kia logikeco 23 el la 25 Ŝtatoj-membroj devus daŭre favori du aliajn per donaco kiu kostas al ili, nur je la nivelo de la eduksisistemo, la « bagatelon » de 26,7 miliardoj da eŭroj ĉiujare, des pli ke tiu masiva strebo lasas la plimulton de la eŭropaj civitanoj en situacio de malsupereco. Antaŭ intereso tiel evidente konverĝa, kaj kiu estas perfekte kongrua kun la postuloj de la socia justeco, la saĝo devus do konduki la Ŝtatojn interkonsenti por progresiva kaj kunordigita starigo de la plano 3. Memkompreneble, tiu kunordigado inter Ŝtatoj ne devas prikonsideri nur la edukpolitikon ; ĝi devas ankaŭ zorgi pri la disvastigo de informado kaj evoluigo de la mensostatoj.*

p. 106 — Konkludo : *Entute ŝanĝiĝas la problemoj tuj kiam la kadro estas tiel plivastigita : se ĝi ne estas facila, ĝi fariĝas solvebla – por la plej granda profito de la impostpaganto, de la socia justeco, kaj de la diverseco de la lingvoj kaj de la kulturoj.*

* **François GRIN :**

- Profesoro pri Ekonomiko ĉe la Lernejo de tradukado kaj Interpretado (ETI) de la Universitato de Ĝenevo.
- Vicdirektoro de la ĝeneva departemento de la publika instruado.
- Konsultanto pri lingva politiko kaj pri politiko de edukado por la oficialaj organismoj svisaj aŭ eksterlandaj, de la organizoj internaciaj kaj neregistraj.